



MARTINUS
INSTITUT

Kosmos

LA KOSMOLOGIO DE MARTINUS

Martinus:

La flago hisiĝas la unuan
fojon

Martinus:

La strukturo de la flago

Ole Therkelsen:

La 90-jara naskiĝtago
de nia Afero

Erik Gerner

Larsson:

Martinus 6

Ejnar Horth:

Rasmus Rask kaj ideala
lingvo

Joel Brozovsky:

Oomoto kaj Martinus

Joel Brozovsky:

Historio de Oomoto

Ole Therkelsen:

Ĉu guto traboras mon-
ton granitan?



Antaŭ 75 jaroj, la 31-an de majo 1936, la flago hisiĝis la unuan fojon en la centro en Klint. La flago estas simbolo de la senfina kaj eterna universo, kiu estas viva estulo. Per aliaj vortoj la flago simbolas la eternan mondbildon. Bonvolu legi la pensojn de Martinus mem lige al la solena inaŭguro de la flago en 1936.

Alia rimarkinda jubileo estas 90-jara datreveno de la naskiĝtago de nia komuna Afero. Antaŭ 90 jaroj, la 24-an de marto 1921, Martinus iniciĝis kaj ricevis kosman konscion en malgranda ĉambro en Jagtvej 52A, 1.tv. Kopenhago. Jam dekomence Martinus konsciis

pri la globa amplekso de sia misio, kaj li ne nur rigardis sian verkon spirita scienco, kosmologio aŭ eterna mondbildo, sed li ankaŭ opiniis, ke ĝi estas sciencigita aŭ intelektigita kristanismo. En 1975 Martinus anoncis, ke lia tuta vivoverko estas *La Tria Testamento*, kiu estas la plenumo de la biblia profetaĵo pri la reveno de Kristo kiel *Spirito de la vero* aŭ *la Parakleto, la Sankta Spirito*. (Vidu Joh. 14,26 kaj Joh. 16,12-15). Tiurilate estas interese, ke sur pluraj bildoj de la releviĝo Kristo portas danan flagon en la mano (ekz. en Isaac Katedralo, St. Peterburgo, p. 11).

Ole Therkelsen



Jagtvej 52A, 1.tv., Kopenhago. – La fenestro de la ĉambro de Martinus situas super la tri virinoj. Super la fenestro de Martinus mankas kapo de leono, sed super la aliaj fenestroj troviĝas tiu besta kapo. Ĉu hazardo?



Martinus pentekoste 1936
Antaŭ 75 jaroj, la 31-an de majo 1936, la flago hisiĝis la unuan fojon en la centro en Klint. La flago estas simbolo de la senfina kaj eterna universo



La flago hisiĝas la unuan fojon

de Martinus

La 31-a de majo estis memorinda tago en la historio de nia spirita laboro. La plej granda simbolo de la vivo en formo de flago, la unuan fojon flirtu en la vento. Teksita per la koloroj de la sunspektro mem, ĝi la unuan fojon povis plivigliĝi malluman kaj pluvopezan printempan ĉielon. La tuta scenaro fariĝis ekstera simbolo de la griza kaj pluvopeza mensa ĉielo, kiu ĝuste, ĉu konscie aŭ nekonscie, premas en la brusto de ĉiu terhomino, kaj kiun dispeli povas nur “la sankta spirito”, alivorte, la spirita scienco, por kiu la flago estas simbolo. Same kiel okazis ke tiu en sia unua tago prezentis siajn lumajn kaj kolorplenajn kampojn sur la fono de malluma kaj griza ĉielo kaj tiel elvokis pripensemon ĉe la spektantaro, sammaniere ankaŭ la spirita scienco per sia radiantanta abundo da koloraj kampoj komencis vekti atenton, komencis elvoki pripensemon en multaj malfeliĉaj koroj, en multaj malgajaj animoj aŭ mallumaj mensoj.

Ke la flago hisiĝu en la supre menciita tago ne estis anticipe anoncita. Mi ne aŭdacis esperi, ke tiel multaj, kiel fakte venis, pretus defii la trafikproblemojn kaj ariĝi ĉirkaŭ mi, starante ĉe mia flanko en tiu ĉi granda momento en

75 jara jubileo en 2011. – Pentekoste la 31-an de majo 1936 en Klint

la historio de nia Afero. Tio ankaŭ estis la kaŭzo pro kiu mi jam malkaŝis la flagon en la altlernejo de Borup la 16-an de marto.

Sed tuj post la malkaŝo mi travivis la ĝojon vidi ke inter la amikoj de la Afero, la emo ĉeesti kiam ĝi la unuan fojon hisiĝu, estis imponega. Ke tiu evento okazu sur la propra teritorio de la Afero ĉe la marbordo de Kategato¹ estis kompreneble evidentaĵo. Kaj pere de favora interkonsento kun veturigisto en Nykøbing ni sukcesis konsiderinde mildigi la ekonomiajn malfacilaĵojn de la veturo por la partoprenantoj.

Ĉar la flago en si mem estas esprimo de “la sankta spirito”, estis altgrade nature, ke la solena tago, en kiu ĝi por la unua fojo hisiĝu, fariĝis la pentekosta tago, kiu ĝuste estas la memortago de “la sankta spirito”. Por ke laŭeble multaj partoprenantoj povu atingi ĉeesti, ni prokrastis la tempopunkton ĝis la 12-a horo tagmeze.

Mi ne vere laŭvorte memoras la paroladon, per kiu mi min esprimis; sed la sentoj kaj la korvarmo, kiuj plenigis min rilate al la ĉeestantoj, restas daŭre vivantaj kaj esence esprimiĝis tiel ĉi:

“Mi kore bonvenigas vin ĉiujn. Tiu mia bonvenigo estas des pli elkora, ĉar vi ĉiuj estas venintaj – ne pro iu specifa invito – ne pro iu ajn anticipa reklamo, – sed sole nur pro via propra ena emo, sole nur pro via amo aŭ simpatio por la Afero, mia Afero, via Afero, la Afero de la tuta homaro.

Samtempe mi sentas emon esprimi, ke kiam ni nun povas kunveni ĉi tie sur la propra privata teritorio de la Afero, – ankoraŭ dum longa tempo en la mondo nepre devas ekzisti “privata posedaĵo”, – tiam la kaŭzo de tio estas sole nur la sama amo, kiu instigis vin ĉeesti ĉi tie hodiaŭ, kaj kiu de tiom da flankoj en mirinda maniero fluas renkonte al mi, kaj kreas favoran venton por mia laboro. Multaj helpemaj manoj estis etenditaj al mi. Kelkaj estas helpintaj en iu maniero, aliaj en alia maniero, kaj tiel La Feria Kolonio KOSMOS² konstruiĝis. Pro la simpatio, kiu tiel estas montrita al mi de miaj amikoj, kaj pro la simpatio, kiu reciproke animas min rilate al ili, tiu ĉi Feria Kolonio fariĝis fokusejo de amo. Kaj estas mia deziro, ke ni ĉiuj estu animitaj de emo kaj ivo fari tiun ĉi malgrandan terpecon liberejo por la amikoj de la Afero, fari ĝin loko, kie la vera homregno en tute fizika praktiko povu komenci sentiĝi tiel forte, ke ĉiu ajn vizitanto komprenu, ke jen oni “deprenu la ŝuojn de siaj piedoj; ĉar la loko, sur kiu oni staras, estas tero sankta”³, – ne en la senco, ke oni devas depreni siajn piedvestojn ĉe la enirejo de la Kolonia tereno, sed ke “la piedvestoj”, en la jena okazo, identas kun ĉiaj malbonaj pensoj pri, kaj malsimpatio al, nia proksimulo. Por tiaspecaj menseco kaj pensklimate estas sufiĉe da tempo kaj spaco en la ĉiutaga vivo ekstere de la tereno de la Afero. Ĉi tie regu spirito, kiu vidas absolute nur la lumon, la bonon kaj amon en ĉiu homo, ĉar ekzistas io dia, luma kaj ama en ĉiu unuopa viva estulo.

Koncentriĝi je tio, okupiĝi pri tiu flanko de la naturo de nia proksimulo, donas grandan konon pri la lumo, donas lumbrilon ĉirkaŭ ĉiu ajn animo, donas sunlumon en ĉiuj okuloj. Ke ni estas kunvenintaj ĉi tie hodiaŭ, tio estas ĉar ni havas la ĝojon povi ĉeesti, ke la simbolo de la sankta spirito, la matematika formulo por la dia mondplano, la esprimo por la eterne senmanka mondbildo, en la formo de flago, la unuan fojon hisiĝas sur la tero.

Mi ĉi tie ne profundiĝu en longan klarigon, ĉar vi ja konas la pli proksimajn detalojn aŭ unuopaĵojn de mia mondbildo de la studrondoj, sed tuj transiros al tiu ĉi por ni tiel solena ago.” Kaj post kiam la flago hisiĝis kaj flirtis en la vento, videbla per ĉiuj siaj kampoj kaj detaloj, mi sentis emon fini jene:

„Kiel vi scias de mia laboro, la ses koloraj kampoj esprimas la ses bazajn energiojn, per kiuj la strukturo de la universo sin manifestas. La blanka triangulo aŭ piramido kun la radioj esprimas la dian “io”, tio, kio travivas la vivon en ĉiu unuopa organismo, dum la violkolora kampo esprimas la dian kreokapablon.

Kiam vi mem vidas tiun ĉi sanktan simbolon flirti en la vento, tio estas ekstere videbla esprimo por la plej alta pensklimate. Kaj dank’ al tiu ĝia identeco kiel simbolo de amo, ĝia flirtado serve al milito kaj malpaco neniam povos okazi sen esti parodio je ĝia destino. Kie tiu la simbolo de lumo laŭrajte flirtu en la mondo, ĉia milito, brutaleco kaj malpaco devas esti ekskomunikitaj. Kaj en la sama maniero, mensa kopio de ĝi flirtu en niaj koroj. Ankaŭ ĉikaze necesas zorgi, ke ĝi ne ŝiriĝu pro la ŝtormoj de la fortaj pasioj, sed ke ĝi konstante povu flirti kaj lumi en atmosfero de freŝaj ventetoj de pardono kaj amo. –

Ĉar ekzistas homoj, kiuj eble en la malfavora vetero vidas malbonan

aŭguron por la flago, mi samtempe indiku ke tian impreson povas kaŭzi nur iluzio. Se la vetero subite ŝanĝiĝus de la stato en kiu ĝi ĉi-momente troviĝas, kaj kiu estas tute natura aŭ plene centelcente normala produkto de la laŭ la sezono regantaj cirkonstancoj en la atmosfero, io nenatura devus okazi, aŭ alivorte: naturkatastrofo. La luno devus elorbitiĝi aŭ la tero subite ŝanĝi sian cirkuladon. Kaj kun tiaj perspektivoj mi tre supozas, ke ni ĉiuj devas esti feliĉaj pri la vetero, tia kia ĝi ĝuste hodiaŭ estas kun sia malvarmeto kaj malsekeco.

Krome ni reprezentas ankaŭ ĉi tie aron da homoj, kiuj iom post iom espereble havu tiom da sunlumo ene de sia propra temperamento, ke ne havus iun speciale depriman signifon, eĉ se la natura suno dum kelkaj momentoj nepre devas kovriĝi per nuboj, tiel ke la por la teraj vivformoj tiel nemalhavebla sekeco povas ellasiĝi.

Kaj per tio mi volas fini petante vin akcepti mian plej profundsantan kaj varman dankon, ĉar vi tiel multnombre kaj fidele venis ĉi tien por esti ĉe mia flanko, kiam mi la unuan fojon en la mondo estis hisonta tiun ĉi por ni sanktan simbolon.”



La flago hisiĝas la unuan fojon. Fotis Martinus

Notoj:

1. Parto de la Atlantiko, situanta norde de la dana insulo Sjælland, ĉe kies norda marbordo Martinus-Centro situas.
2. En 1977, la nomo estis ŝanĝita al “Martinus-Centro”, ĉar Martinus volis ke la nomo respiegulu la intencion ke la Centro estonte fariĝu spiritscienca universitato.
3. La Biblio, La agoj de la apostoloj 7,33.

El dana originalo “Flaget hejses første gang”, Kosmos n-ro 6, 1936.

Traduko Henning Sato von Rosen, 2011



La strukturo de la flago

La flago estas la ekstera videbla bildigo de la plej alta pensklimoto. Ĝi estas la simbolo de la sankta spirito, la matematika formulo de la dia mondplano, la esprimo pri la eterna perfekta mondbildo. Kaj pro tiu sia identeco kiel la simbolo de la amo, ĝia flirtado serve al milito kaj malpaco neniam povas okazi sen esti parodio de ĝia destino. Tial, kie tiu simbolo de la lumo devos plenrajte flirti en la mondo, ĉiaj milito, brutaleco kaj malpaco devos esti forigitaj. Kaj sammaniere mensa kopio de ĝi devas flagi en niaj koroj. Ankaŭ tie estas tiel, ke la ŝtormoj de la fortaj pasioj ne disŝiros ĝin sed la tutan tempon ĝi povos flirti kaj lumi en atmosfero de la freŝa venteto de la pardono kaj amo.

La blanka triangulo kun la blankaj radioj en la mezo de la bildo esprimas la bazan analizon de la universo, "la triunan principon": La kreanton, la kreokapablon kaj la kreaĵon, kiuj plue en "Livets Bog" ricevis respektive la nomojn: X1, X2 kaj X3. Tiu triunua principo esprimas precize tiujn tri kondiĉojn, kiuj necesas, por ke iu "io" povu aperi kiel "viva estulo".

Pro dekoracio tiu triunua principo estas bildigita en la flago en duobla formato. La piramido, kiu mem esprimas la tuton,

esprimas ĉi tie precipe X1, "la dian ion" aŭ tion, kio travivas la vivon en ĉiuj vivaj estuloj. La figuro ĉirkaŭ la piramido kaj inter la blankaj radioj estas violkolora kaj esprimas "la patrinan energion", X2 aŭ "la dian kreokapablon, kiu tie manifestiĝas en la energiaktivado de ĉiuj vivaj estuloj.

La kvin grandaj figuroj de malsupre supren en la flago havas jenajn kolorojn: ruĝan, oranĝan, flavan, verdan kaj bluan. Ili esprimas kvin el la ses vivsferoj, en kiuj la universo aperas, kaj tiuj ses vivsferoj estas bazitaj sur la ses bazaj energioj. La sesa vivsfero estas montrita en la flago per la mallarĝa figuro supre kaj la mallarĝa figuro malsupre. Tiuj du figuroj estas indige koloraj.

La flago sekve aperas kiel simbolo de la tuta universo, kaj per sia strukturo ĝi do prezentas la plej altan formulon de ĉio ekzistanta, de ĉio ekzistinta, kaj de ĉio ekzistonta.

Ĉio estas do esprimita per tiu unu bildo, kaj tial ĝi povas prave esti simbolo aŭ indikilo de Dio, la saĝo kaj la amo, simbolo aŭ indikilo de "la sankta spirito".

La Eterna Mondbildo 4, n-ro 42

La 90-jara naskiĝtago de nia Afero

de Ole Therkelsen



Martinus iniciĝis kaj ricevis kosman konscion la 24-an de marto 1921, kaj tiun tagon li nomis la naskiĝtagon de la Afero. Martinus opinias, ke lia persono ne gravas, kaj pro tio oni estontece ne festenos lian naskiĝtagon, sed tiun de la Afero aŭ la misio.

1. Fabelo el la reala vivo

Retroen-rigardante tra la jarmiloj, ni vidas ke fojfoje naskiĝas tute eksterordinara geniulo. Laŭ mia opinio, sur ĉi tiu bela blua planedo, nin vizitis morala geniulo en la formo de la mondrenoviganto Martinus (1890-1981).

La 11-an de aŭgusto 1890, Martinus Thomsen naskiĝis ekster geedzeco en Sindal en Norda Jutlando, kie li pasigis sian infanaĝon kaj la unuan parton de sia junaĝo. Unue li trovis laboron ĉe bienoj, kaj poste li edukiĝis kiel laktajisto. Poste li laboris ĉe laktajejoj diversloke en la provinco, ĝis sia transloĝiĝo al Kopenhago, kie li 30-jara travivis grandan konscivastiĝon.

Dum sia tuta vivo, Martinus vivis tre simple kaj ŝpareme, kaj dum la daŭro de sia vivo, li ne altiris iun konsiderindan publikan atenton.

En la pasko en marto 1921 Martinus trapasis tion, kion li mem nomis “la granda naskiĝo”, per kiu li ekhavis “kosman konscion”. Tiu naskiĝo aŭ iniciĝo, kiu daŭris kelkajn tagojn, verŝajne ne estus havinta iun konsiderindan signifon, se ĝi ne estus postlasinta Martinus en nova konscistato kun permanentaj intuiciaj aŭ kosmaj sensokapabloj. Per tiuj novaj sensokapabloj li ekhavis aliron al nova mondo, kaj li, se tiel diri, naskiĝis en pli altan mondon. Juĝante laŭ la scienco de amo, kiun li poste kreis, tiu mondo estis lia reala kaj

natura hejmloko. Ŝajnas al mi, ke ni en nia tempo sur la tero havis viziton de gasto el pli alta mondo.



Martinus 1921

2. La fono de la verkisteco de Martinus

En *Ĉirkaŭ la naskiĝo de mia misio* kaj *Livets Bog* Martinus rakontas, ke la aktiva fono por lia tuta verkisteco estis la profunda konsciŝanĝo, kiu okazis en marto

1921, dum kiu li travivis “la blankan fajrobapton” kaj “la oran fajrobapton”.

Martinus: “La kosma fajrobapto, kiun mi trapasis, kaj kies detalan analizon mi ne povas trakti ĉi tie, do postlasis tiun fakton, ke en mi estis aktivigitaj tute novaj perceptokapabloj. Tiuj kapabloj ebligis al mi – ne en ekbriloj – sed male en konstanta maldorma stato de tagokonscio – vidi malantaŭ la fizika mondo ĉiujn portantajn spiritajn fortojn, nevideblajn kaŭzojn, eternajn mondleĝojn, bazajn energiojn kaj bazajn principojn. La mistero de la vivo sekve ne estis mistero por mi. Mi fariĝis konscia pri la vivo de la universo kaj estis incita en la dian kreoprincipon.” (Livets Bog, vol. 1 § 21).

Post la menciita fajrobapto Martinus sekve ekhavis novajn kapablojn, kiuj ebligis al li enrigardi la eternon kaj senfinon mem. La 24-an de marto 1921 Martinus ekhavis permanentan kosman konscion.

Martinus: “Mi vidis, ke mi estas senmorta estulo, kaj ke ĉiuj aliaj estuloj en la vivo estas eternaj realaĵoj havantaj, same kiel mi mem, senfinan ĉenon de antaŭe travivitaj vivoj malantaŭ si. Mi vidis, ke ni ĉiuj estas evoluintaj de malaltaj, primitivaj formoj de vivo al nia nuna stadio, ke tio estas nur provizora stadio en tiu evoluskalo, kaj ke tiel ni survojas antaŭen al gigante altaj formoj de vivsferoj en la foro. Mi vidis, ke la universo estas ununura granda viva estulo, en kiu ĉiuj aliaj estuloj unuope estas organoj, kaj ke ĉiuj ni homoj, bestoj, plantoj kaj mineraloj estas unu familio, estas, metafore dirite, el samaj karno kaj sango.” (Livets Bog, vol. 1 § 21).

En la sekvaj 60 jaroj de sia vivo, li verkis, dank’ al siaj kosmaj kapabloj, verkaron je proksimume 9000 paĝoj, tiel kreante tute novan spiritan sciencon kaj tute novan mondbildon – *La Eterna Mondbildo*. En sia sepvoluma ĉefverko *Livets Bog*, kiu ampleksas preskaŭ 3000 paĝojn, Martinus en unu loko uzas la esprimon “la eterna saĝo” pri sia verko. (Livets Bog, vol. 1 § 7).

3. La meditado kiu aktivigis la konscivastiĝon

En 1921, Martinus laboris en la oficejo de la laktajejo “Enighedén”, kie li aŭdis pri nova interesa libro kun spiritaj temoj, kiun legis unu el liaj kolegoj. Kiam Martinus certiĝis, ke tiuj novaj spiritaj direktoj ankaŭ rilatis al preĝado, li ekinteresiĝis prunti la libron, kaj iun tagon en februaro 1921, li estis invitita al la hejmo de la persono kiu posedis la libron, Lars Peter Larsen (1879-1948),

kiu poste ŝanĝis sian nomon al Lars Nibelvang.

Martinus mem rakontis ke li ne havis okazon legi la libron ĝisfine, kaj ke la sola kion li memoras de la legata peceto, estas ke ĝi instigis lin mediti je Dio. Kiam Martinus dek jarojn poste komencis verki siajn librojn, li memoris nek la titolon nek la verkinton de la libro, pro la forta efiko de la granda spirita travivaĵo al lia cerbo.

Post la granda konscivastiĝo Martinus tute ne kapalis legi pro psikaj kialoj.

Martinus: “La nura imago legi en libro sufiĉis por igi min senti, kvazaŭ mia cerbo krevos. Kaj en la periodo, kiam mi trapasis la menciitan spiritan proceson, ĝis mi komplete trarigardis la tutan mondbildon kaj manifestis ĝin en bilda formo, mi do ne legis en iu ajn libro kaj ne estis en kontakto kun iu ajn alia formo de teoria gvido. Tiel same antaŭ la vekigo de miaj kosmaj kapabloj mi estas karakterizebla kiel viro tute sen studoj. Mi nome neniam studis, sed ricevis nur la ordinaran vilaĝlernejan instruadon, kiu por mi, kiu naskiĝis en la kamparo, ampleksis nur tri horojn dufoje semajne en la somero kaj iom pli en la vintro.” (Livets Bog, vol. 1 § 22).

Martinus poste legis nek teozofiajn nek antropozofiajn librojn. Tial estas erare, kiam oni en aliaj verkoj asertas, ke Martinus sin apogis sur la teozofio aŭ la antropozofio, dum la kreado de sia mondbildo. En la lernejo, Martinus tre ŝatis biblian historion, sed li forte emfazis, ke li ne ekhavis sian scion per legado aŭ studado. (Libreto 12B – *La vojo al iniciĝo*, ĉap. 25).

Martinus diris: “Ne malmultaj diris al mi ke certe mi multe legis kaj studis, sed tiel ne estas. Mi estas vivanta pruvo ke oni povas veni al la plej alta scio pere de sia propra konscio, kaj tio

estas stato al kiu ĉiuj homoj survojas.”
(Kosmos n-ro 3, 1991).



La kansĝo en kiu Martinus meditis.
Eblas vidi la seĝon en la muzeo “Martinus
Mindestuer” (Memorsalonoj de Martinus).

4. La kristovizio kaj “la blanka fajrobapto”

Lars Nibelvang notis en siaj taglibraj folioj, ke li estis doninta al Martinus parolajn instrukciojn pri kiel oni povas mediti sidante en komforta seĝo kaj eventuale surmeti okulbendon por ŝirmi sin kontraŭ lumo kaj tiel pli bone povi koncentriĝi. Post tio Martinus tiucele aĉetis kanfotelon, kaj li rakontis ke ĝi estis tre viva, tute magneta kaj ke ĝi konstante knaris. (Kosmos n-ro 3, 1991).

Martinus loĝis en malgranda apartamento en Jagtvej 52A^{1.tv.} en Kopenhago, kiam li iun vesperon dum la pasko en sia kanfotelo travivis la blankan fajrobapton, kiu estis vizio de Kristo.

Dum tiu ĉi koncentriĝo je Dio, Martinus en tagkonscia kosma vizio travivis sian alvokiĝon por krei la kosman sciencan, kiu logike kaj intelekte klarigu tiun “multon”, kiun Jesuo ne povis klarigi al la disĉiploj, ĉar ili tion ne povintus elteni. (*La intelektigita kristanismo*, Antaŭparolo kaj § 2).

Martinus estis sidinta ne tre longe, kiam li vidis lumantan punkton en la foro, kaj subite aperis kristofiguro. Estis la skulptaĵo farita de la dana skulptisto Bertel Thorvaldsen, kiu bildigas Kriston kiam li diras: “Venu al mi” (La katedralo de Kopenhago). – La figuro estis malgranda kaj staris iom for. Mallumiĝis, kaj kiam revenis la lumo, la figuro aperis viva kaj en natura homa grando. Ĝi estis vestita per vesto el brilaj steletoj, preskaŭ kiel mantelo el diamantoj. Ĝi estis treege brila, la lumo estis neĝe blanka, kaj la ombroj bluaj. Tiu Kristo-estulo el blindiga sunlumo tute kviete alproksimiĝis al Martinus, kiu sidis kvazaŭ paralizita en sia kanfotelo. Li rigardis rekte en estulon el fajro, kiu konsistis el malgrandaj brilaj punktoj, similaj al la fajreroj de stelŝprucilo, nur pli malgrandaj. Fine la figuro venis rekte en la korpon de Martinus, en lian internon. Ĉi tie ĝi haltis kaj restis staranta. Mirinda alta sento lin kaptis, kaj la parolado estis for. La dia lumo kiu tiel estis ekloĝinta ene de Martinus, donis al li kapablon panorame rigardi la mondon. De la dia figuro ene de Martinus eliris enorma lumradio, kaj en tiu lumo Martinus povis vidi la terglobon turniĝi. Li vidis kontinentojn kaj marojn, urbojn kaj landojn, montojn kaj valojn baniĝi en la lumo el lia propra interno. En la blanka lumo, la tero transformiĝis al Regno de Dio. Kaj per tio la supertera dia kristovizio finiĝis. (*La intelektigita kristanismo*, § 2; Libreto n-ro 4 – *Ĉirkaŭ la naskiĝo de mia misio*, ĉap. 16).



La Kristo-skulptaĵo de Bertel Thorvaldsen (1770-1844). La katedralo de Kopenhago kaj la muzeo de Thorvaldsen.

5. La alvokiĝo de Martinus por fariĝi mondinstruisto

Post la Kristo-vizio, Martinus sentis sin alvokita fariĝi mondinstruisto. Kiam la Kristo-figuro eniris en lin, kaj li vidis la lumon disradii sur la teron, li tion travivis kiel signon ke Kristo persone lin incis por daŭrigi la kristomision. Tio ke la terглоbo turniĝis en tiu lumo de Kristo, simbolis ke lia misio estis tutgloba. Li sentis ke Dio lin estis elektinta por sciencigi kaj intelektigi la kristanisman kaj konduki ĝin al ties fina plenumiĝo ĉi tie sur la tero.

Martinus skribas: “Se dum la vizio estus tempo kaj eblo por tio, mi certe estus prezentinta kontraŭargumentojn, same kiel Moseo, kiam li per la vizio en la dia fajro de la dornarbusto estis alvokita por elkonduki la izraelidojn el Egiptio. Same kiel li sentis sin ne havi

sufiĉajn kvalifikaĵojn por plenumi tiun tre malfacilan mision, tiel ankaŭ mi kiel needukita persono sen ajna kosma scio, estus prezentinta kontraŭargumentojn rilate al nesufiĉaj kvalifikaĵoj. Sed, kiel menciite, por tio ne estis tempo. Kaj cetere, tiaj pensospecoj ne estus esprimoblaj ĉi tie. Dum la sekvaj horoj mi estis tiel spirhaltige ensorbita en la dia supertera potenco, kiu per la vizioj faris min neŝanceleble konscia en tiu mia kosma alvokiĝo aŭ iniciĝo de mia vivo por la perfektigo de la kristanismo ĝis scienca aŭ neŝanceligeble logika vivfundamento por la finkreado de la homaro laŭ la bildo de Dio.” (*La intelektigita kristanismo*, § 2).

6. La travivaĵo de Martinus de la ora fajrobapto

Antaŭtagmeze la tagon post la Kristo-vizio, Martinus travivis la oran fajrobapton, kiu estis universala travivaĵo de la universo aŭ la konscio de Dio. Li sidiĝis komforte en sia kanfotelo, kaj refoje li rapide estis envolvita en dia lumo. Ĉielo ekvideblis, kiu estis el tiel abunda blinda ora lumo kaj el tiel rapide vibranta materio, ke li sentis, ke li troviĝas je la maksimumo de tio, kion lia organismo kaj konscio povus elteni. Li troviĝis en maro da lumo, kiu ĉi-foje ne estis el la blanko de neĝo, sed nun ĉio estis orkolora. Tra la tuto vibris fajnaj oraj fadenoj, kiuj trembrilis kaj rebrilis ĉiuloke. Li sentis, ke tio estas la konscio aŭ propra pensosfero de Dio. Jen la fonto de la ĉioamo mem. (*Libreto n-ro 4, Ĉirkaŭ la naskiĝo de mia misio*, ĉap. 17).

La ora aŭro kunigas la konsciojn de ĉiuj vivaj estuloj en unu komunan konscioceanon kiu konsistigas nenion malpli ol la konscion de Dio mem. Al Martinus ĝi aperis kiel miloj da vibrantaj oraj fadenoj, kiuj tute plenigis la spaccon. En tiu ĉi ora aŭro li spertis esti en la hejmloko de sia eterna mio, havante ekziston ekster ĉio, kio alie estas videbla kiel kreitaj fenomenoj. Li troviĝis

ekstere de tempo kaj spaco, estis unu kun la senfino kaj eterno. La spaco nur percepteblis kiel lumoceanano, trabrilita de orkolora lumo. En tiu lumoceanano el trembrilaj oraj fadenoj, sentebblas nur unu sento, nome la sento esti unu kun Dio kaj unu kun ĉiuj aliaj vivaj estuloj en la universo. Ĉi tie oni troviĝas ĉe la panoramejo de Dio mem, onia menso kunfandiĝas kun la menso de la universo. Oni fariĝas unu kun la kosmo. (*La intelektigita kristanismo*, § 3, 6 kaj 11).

7. Sciencigita kristanismo

Martinus ne nur rigardis sian verkon spirita scienco, kosmologio, aŭ eterna mondbildo, sed li ankaŭ opiniis ke ĝi estas sciencigita aŭ intelektigita kristanismo.

La kristanismo en sia komenca stadio ja estis religio, sed laŭ Martinus ĝi fariĝos scienco, eĉ la mondscienco mem, kiu kunigos la tutan mondon. Ĝi unuigos religion kun scienco, koron kun cerbo kaj la orientan pensadon kun la okcidenta. Kiam la eternaj analizoj eniros en la kristanismon, oni vidos ke la tuto kongruas kun la amo kaj la senfinco, kaj tiam la kristanismo fariĝos scienco kaj ĉesos esti kredo, Martinus opiniis.

Tiu scienco de amo elmontras ke ĉio en sia fina rezulto konfirmas la bibliajn vortojn “ĉio estas tre bona”. Martinus do opinias, ke estas ĝuste, kiam oni en la biblio post la kreado de la mondotuto lasas Dion diri: “Vidu, ĉio estas tre bona”.

Martinus rilatigas sian verkaron al la du pli fruaj testamentoj en la biblio donante al sia spirita scienco kiel tuto la titolon La Tria Testamento, ĉar li rigardis sian laboron kiel daŭrigon de la “kristomiso”. Martinus indikis ke lia verko La Tria Testamento estis identa kun la intelektigita, senmorta kristanismo, kiu fariĝos la vivfundamento de la homaro kaj la fundamento de la nova mondmoralo.

Martinus havis la opinion, ke tiu nova spirita scienco estas la “Spirito de la vero”, aŭ “la Parakleto, la Sankta Spirito”, kiu venos laŭ la antaŭdiro de Kristo rilate al la venonta vivrenovigo fare de la kristanismo:

“Sed la Parakleto, la Sankta Spirito, kiun la Patro sendos en mia nomo, instruos vin pri ĉio, kaj vin rememorigos pri ĉio, kion mi diris al vi.” (Joh. 14:26).

“Mi havas ankoraŭ multon por diri al vi, sed vi ne povas ĝin nun elporti. Tamen kiam venos li, la Spirito de la vero, li gvidos vin en ĉian veron; ĉar li parolos ne de si mem; sed kion ajn li aŭdos, tion li parolos; kaj li anoncos al vi venontajn aferojn. Li gloros min, ĉar li ricevos el miaj kaj anoncos al vi. Ĉio ajn, kion la Patro havas, estas mia; tial mi diris, ke li ricevos el miaj kaj anoncos al vi.” (Joh. 16:12-15).



Kristo kun la dana flago. La dana flago estas uzata en la ortodoksa eklezio kiel simbolo de la releviĝo de Kristo. La katedralo de St. Isaac en Sankt-Peterburgo.

8. La sola bezonaĵo kaj la daŭra paco sur la tero

Kio do estas la celo de la laboro de Martinus? – Unu el la respondoj oni povas trovi en la “antaŭparolo” de la unua libro, kiun Martinus eldonis en 1932, nome la unua volumo de la ĉefverko *Livets Bog en sep volumoj*.

Ĉar la teraj homoj ne havas inter si la samajn spertojn kaj scion, ili troviĝas en malsamaj ŝtupoj en sia evoluo de la mallumo al la lumo. Sed je certa ŝtupo en tiu evoluo fariĝas neeviteble akiri absolute veran konon pri la senco de la vivo, pri la plej profundaj leĝoj kaj eternaj bazaj principoj de la vivo, por povi atingi la absolutan feliĉon aŭ la perfektan sorton. Por tera homo kiu ankoraŭ ne estas kosme konscia, la akiro de tia kono do fakte estas “la absolute ununura neceso”. (*Livets Bog*, vol. 1 § 6).



La gipsa kopio de Kristo en la apartamento de Martinus

Per sia kosma konscio, Martinus estis mem travivinta tiujn eternajn leĝojn kaj principojn de la vivo, kaj per tiu sia senpera scio pri la vero aŭ la eterna saĝo, li sentis devon fari tiun scion alirebla je la utilo kaj ĝojo de la publiko. La tuta verko de Martinus sekve estas rezulto de devosento. (*Livets Bog*, vol. 1 § 7).

Same kiel oni uzas geografiajn mapojn por faciligi la studadon de geografio en la lernejo, Martinus faris simbolojn por faciligi al la publiko studi la kosmologion. La fundamenta bazo por la kreiĝo de la tiel longe sopirata “daŭra paco” sur la tero, laŭ Martinus ĝuste estas la rezulto de la studo kaj kompreno de la kosmaj analizoj disvastigitaj al la homamasoj. (*Livets Bog*, vol. 1 § 8).

9. Martinus kaj la nova mondmoralo

Rilate al sia prelega aktiveco kaj la laboro kadre de Martinus-Instituto en Kopenhago kaj Martinus-Centro en Klint Martinus ofte aŭdis la demandon: Pri kio vi fakte laboras? – Dum prelego en junio 1975 li respondis tre mallonge kaj klare: “Efektive la definitiva respondo estas, ke tio estas mondmoralo. Jes, temas pri la mondmoralo mem”. (*Kosmos* nr 7, 2004).

Martinus do laboris pri la mondmoralo mem, kiu baziĝas sur la absoluta vero kaj la absoluta ĉioamo. El pure akademia aŭ filozofia vidpunkto povas esti tre interese studi la spiritan sciencon de Martinus, ĉar ĝi kontribuas al novaj kaj ĝis hodiaŭ ne konataj solvoj de multaj ekkonteoriaj kaj filozofiaj problemoj; sed lia laboro havas ankaŭ tute alispecan, praktikan celon, nome kontribui al la kreado de nova mondkulturo bazita je nova mondmoralo.

Traduko Henning Sato von Rosen, 2010



Martinus 6

La dia kread-principo. La luma elradiado

de Erik Gerner Larsson

Ĉar la tuteca elvolvo de la dia kread-principo en la kosmo manifestiĝas en formo de malluma kaj luma elradiadoj, ni ĉi tie atentigas pri tio, ke la sperto pri la vivo de la vivanta estulo formiĝas kiel alterna travivaĵo de kulminanta mal-lumo kaj lumo, eterne daŭriganta en pli kaj pli altaj formoj. En sia evoluo la surtera homo nun atingis tiun duonon de la spiralo, kie la luma radiado antaŭlonge komencis aperigi sin, tiel ke la influo de ĝiaj energioj nun estas treege videbla. Ĉar la efiko de ĉi tiuj energioj estas la kontraŭaj de ĉio, kio estas konata sub la percepto “la malbono”, tiam la surtera homo facile identigas ĉi tiujn energiojn kiel “diajn” kontraŭe al la dolorportantaj kaj neagrablaj, kiujn ĝi dank’al sia eta spirita scio alproprigas malbonan kaj malluman devenon: “la diablo”, “Satanano”, “Lucifero” k.t.p.

Martinus kontraŭe montras al ni, ke la spirita kresko de la surtera homo ĉiam estis gvidata de incitaj estuloj, t.e. estuloj, kiuj en evoluo estas tiel progresintaj, ke ili pere de sia propra sperto havigis al si tiun koncepton, kiu estas necesa por krei tiun moralon kaj idealismon, sur kiuj kulturoj estas konstrueblaj. Tia estulo estas hodiaŭ konata sub la nomo de “Mesio”.

Ĉar la homaro jam delonge troviĝas sub la efikoj de la luma elradiado de la kread-principo tiel, ke la rekta gvidado de la incitaj estuloj de la malluma elradiado perdiĝas profunden en la mallumo de la estinteco, ni ĉi tie havas kaŭzon de la mankanta scio pri ĉi tiuj estuloj kiel kulturportantoj.

Sed la pruvon pri la supre menciita vero ni havas en tiu fakto, ke la mondmoralo kreita de ĉi tiuj estuloj, ĉiam estas la reganta en la mondo. Ĉi tio eble estas pli komprenebla, kiam oni ĉi tie diras, ke ĉiu defendo de perceptoj kiel: malamo, venĝo, milito, vola kaj nevola mortigo, puno, manĝado de viando, “justa kolerego” kaj “sankta kolero” k.t.p. estas konsiderendaj kiel detaloj en la moralo de la malluma elradiado.

La moralo de la luma elradiado, kun siaj klaraj postuloj pri amo al sia proksimumo kaj sia deteno de venĝo, estas tamen nur en sia ekkresko. La surtera homo de hodiaŭ vivas en realeco sur duobla moralo. En ĝia interno estas konflikto, kaj ĉi tiu konflikto estis neniam pli klare formulita ol per la vortoj de Paŭlo: La bonon, kiun mi volas, tiun mi ne faras. La moralo de la malluma elradiado fariĝis *kutimo* de la surtera homo, la moralo de la luma elradiado ankoraŭ nur konsistas el tiuj idealoj, pri kies iama plenumiĝo ĝi revas.

Sed sub la formo de ĉiam kreskantaj instruigaj faktoroj, en formo de la neevitebla reveno de la mentala mallumo ne nur al la unuopa persono, sed por la tuta socio, la luma elradiado plenumas sian mision. La kreskado de la amo sub la formo de hospitaloj, maljunulaj hejmoj, socia prizorgo, k.t.p. ĉi tie parolas sian propran lingvon kaj atestas, ke tiu regno, kiun Kristo esprimis kiel “ne estanta el ĉi tiu mondo”, malrapide estas aperanta sur la kontinentoj de la tero.

Tradukis Margrethe Noll en 1939

Rasmus Rask kaj la ideala lingvo

de Ejnar Hjorth



Dana lingvisto Rasmus Rask

La plej elstara dana lingvisto iam ajn, Rasmus Rask (1787-1832), traktis la problemon de ideala lingvo. En la reĝa biblioteko en Kopenhago troviĝas manuskripto, datita 1823, en kio li menciis la principojn por ideala internacia lingvo aŭ “ĝenerala lingvo”, kiel li esprimis tion. Li do faris tion 64 jarojn antaŭ ol Zamenhof eldonis Esperanton. La ideoj de Rask estas preskaŭ samaj kiel tiuj de Zamenhof. En iom arkaika dana lingvo Rasmus Rask priskribis la principojn de “ĝenerala lingvo”:

“Pluraj erudiciuloj okupiĝis jam pri proponoj por ĝenerala lingvo kaj rigardis tion kiel tre gravan aferon por la homaro. Ŝajnas ankaŭ en si mem esti granda kaj bela penso skribi por nia tuta homa gento, almenaŭ por la erudiciuloj de ĉiuj landoj kaj de ĉiuj estontaj tempoj kaj povi senpere ekscii pri deziroj kaj sentoj de la fremdulo kaj same kontentigi lian bezonon kaj rekte partopreni en sociaj plezuroj sur malproksimaj marbordoj kaj kion ceteran oni povas imagi kiel frukton de tia belega inventaĵo.” [...]

Por indiki ties eblon kaj motivi la deziron de ties realigo oni argumentis: Ĉar la homa racio estas [nur] unu, la naturo estas unu kaj la vero estas unu, tial ankaŭ devus esti nur unu esprimmaniero de la racio por la tuta homaro. La lingvo devus esti unu kaj sama ĉie sur la tuta tergloblo.

Estas nekontesteble, ke la multaj diversaj vortoj, kiel en si mem indiferentaj signoj, per kiuj oni markas en diversaj lingvoj la samajn nociojn, plej ofte estas tute senutilaj kaj sekve ĝenaj. Ekz. estas tute sensignife, ĉu oni la “domo”n nomas oikos, domus, casa, maison, Haus, bait (arabe), uy (tatare), kota (finne), iglo (gronlande) aŭ ankoraŭ alimaniere. Tiuj multaj plene samsignifaj vortoj kaŭzas nur

tempoperdon al la junularo, ŝarĝon al la memoro, malhelpon al la disvastiĝo de utilaj scioj, al societemo kaj al aliaj entreprenoj en la vivo, kaj malhelpas la liberan interŝanĝon de pensoj inter personoj el malproksimaj landoj kaj nacioj.

Kiom da penoj necesas al junulo, ekz. en Ruslando, por ellerni la germanan aŭ la francan lingvon tiagrade, ke li povu kompreni profesoron aŭ dominstruiston kaj sur tiu pena vojo esti enkondukata de li en la regionon de la sciencoj? Kaj kiel forte la diverseco de lingvoj kaj skriboj malhelpas al la rusa simpla popolo lerni de la fremduloj, loĝantaj ĉe ĝi. Pro tio oni apenaŭ povas dubi pri la utilo kaj la merito de ti-aspeca inventaĵo kiel la ĝenerala lingvo, sed ĝia ebleco estas alia afero.

Tial, se kun almenaŭ pli malgranda problemo oni volas havi esperon atingi la celon, devas esti la unua ĉefa postulo elekti la ŝtufon por la universala lingvo el ĝenerale konataj, alte kulturitaj kaj multe disvastiĝintaj lingvoj.

La lingvoj greka, latina, hispana kaj portugala, franca kaj angla havas ĉi-rilate la plej pravigeblajn pretenojn. Ili enhavas ja senfinan amason da vortoj kaj derivaĵoj, kiuj jam konataj [...] kaj tial per si mem survojas al la

formado de ĝenerala lingvo kaj ŝajne nur postulas kaj atendas “ordigantan manon”.

Vera ekzemplo de ĝenerala komunikilo estas la latina, kiu dum longa tempo estis taŭga. Do, nun ĝi perdis tiun rangon, kaj ĝi estas tro nenatura en la fleksio, aŭ tro komplika en la vortkunmetado, aŭ tro neregula en la derivado, aŭ tro miksa en la leksiko, aŭ tro deflanka en la prononcado kaj kontraŭracia en la ortografio. Kaj tiuj fenomenoj igas ĝin malkonvena iam ajn denove servi al la universaleco. Poste la franca lingvo anstataŭigis la latinan, sed ĝi estis precipe limigita al nobelaro kaj kortego. La angla havas grandajn postulaĵojn. La franca kaj la angla ne sukcesis anstataŭi la latinan.

Oni povus elekti iun alian nacian lingvon, kiel internacian lingvon, sed tio povus parte ofendi la sentojn de aliaj naciuloj, kaj parte neniu el tiaj lingvoj taŭgas tiel, kiel ili estas. Oni ne povas imagi alian solvon ol krei novan lingvon.”



Dana lingvisto Rasmus Rask (1787-1832)

UNUA SKIZO DE ĜENERALA LINGVO

1. La lingvoj latina kaj greka estu la bazo, ĉar ili estas la plej [vaste] konataj bazlingvoj en la mondo.
2. El ili oni elektu tiujn vortojn, kiuj en la pli novaj lingvoj estas la plej kutimaj ... el kiuj oni eltiru la radikformojn ...
3. El aliaj lingvoj oni prenu tiajn vortojn, kiuj fariĝis ĝeneralaj ...
4. El la tiel kolektitaj, jam en aliaj lingvoj komplete formiĝintaj vortoj, oni prenu derivelementojn, ekz. -an.
5. La fleksio-formojn oni modifu laŭeble sekvante la latinidajn lingvojn kaj oni reduktu ilin, simpligu kaj harmoniigu.
6. La vortradiko neniam ŝanĝiĝu, nek per vokalŝanĝo, nek per radikmallongigo.
7. Ĝeneralaj nocioj estu derivataj per prefiksoj, utiligeblaj ĉe tiuj vortklasoj, specialaj nocioj per sufiksoj.
8. Substantivoj havas nur la naturan genron (ne la t.n. gramatikan).
9. La adjektivoj estas tute neflekseblaj.
10. Ĝenerale la akcento falas sur la antaŭlastan silabon.
11. La prononcon oni igu belsona kaj la ortografion simpla kaj regula, tiel ke ĉiu litero konservu ĉie la saman sonvaloron; neniu muta litero estu skribata.

La “ordiganta mano” venis 64 jarojn poste, kiam Zamenhof kreis Esperanton. Tion li faris preskaŭ laŭvorte de tiaj supre menciitaj reguloj. Li ne konis ilin, ĉar la laboro de Rasmus Rask neniam estas eldonita. Tio ke du geniuloj de lingvo, sendepende unu de la alian, atingis la saman rezulton, donas al ni garantion de la kvalito kaj vivoporto de Esperanto.



Oomoto kaj Martinus: du malsamaj vojoj al la sama celo

de Joel Brozovsky

En la dua numero por 2010 de la esperanta Kosmos, Mathias Dalmose, studanto de la kosmologio de Martinus, rakontis tre interese pri la historio inter la japana religio Oomoto kaj Martinus kaj pri siaj spertoj ĉe la ĉefsidejo de Oomoto.

Kvankam tre videblas evidentaj diferencoj inter la du movadoj, ekzistas ankaŭ gravaj similecoj. Oomoto estas religio bazita sur la tradicioj de japana Ŝintoismo; Martinus lanĉis sian instruon surbaze de la kristana Biblio, sed li temas pri racia kompreno de la kosmo sen religieco, ritoj, kaj bezono de “blinda” kredo.

Al ambaŭ movadoj tre gravas la celo evoluigi mondan pacon. La vortoj uzataj kaj la koncepta strukturo por instrui ĝin tre malsamas, sed la baza esenco estas tre simila: amo. Martinus klarigas la racion malantaŭ vivprincipoj kiuj neeviteble gvidas nin al pli profunda esprimado de amo; li montras kiel neamaj agoj, vortoj, kaj pensoj kaŭzas al ni mem

suferon tiel ke ni nature (iom post iom) lernas eviti ilin kaj preferi amesprimojn en niaj interrilatoj. Dume, tre baza instruo de Oomoto temas pri la bezono “purigi sian koron” por povi manifesti puran amon. Martinus uzas konceptan, racian metodon, dum Oomoto emfazas metodojn travivajn, malpli konceptajn.



Ib Schleicher, s-ro Kinsuke Itoo, s-ino Yumijo (Iwamoto) Sakamoto, Martinus, s-ino Joshi Suzumori en Instituto 1966

Ili ambaŭ plene akordas pri konkretaj esprimoj de mondpaco, ekzemple uzo de Esperanto kaj kunlaboro inter mondreligioj kaj aliaj gvidantoj.

Antaŭnelonge oni ĉe Oomoto petis min mallonge paroli pri miaj spertoj kun Oomoto. Ĉar mi laboris en la internacia fako de Oomoto de 1988 ĝis 2000, mi facile povus paroli dum tuta semajno sub tiu temo. Sed kion diri en nur unu paĝo?

Certe la okazo vivi en Japanio, en kulturo tre malsama ol la mia (usona), estis tre valora al mi. Kaj ĉar Oomoto konservas la tradiciojn de Japanio pli ol en multaj aliaj partoj de la lando, mi povis tie tre bone sperti esencon de la japanaj spirito kaj kulturo.

Laŭ mia opinio, tamen, plej grava estas la spirita influo kiun mi ricevis ĉe Oomoto. Multaj el la instruoj de Oomoto bone kongruas kun miaj propraj kredoj (kiujn ne malgrave influis Martinus), kaj mi lernis multe ĉe Oomoto. Miaj konceptoj pri la universo, precipe la spirita parto de ĝi, multe evoluis. Sed



Martinus, Jasumi Hirose kaj Eiji Deguchi, pentekoste 1957

pli grava ol tio estas la evoluo interne de mi.

Dum mi restis ĉe Oomoto mi iom konsciis pri iom post ioma interna evoluo, sed mi ne plene komprenis ĝian amplekson. Nur post mia reveno al Usono mi povis konstati la grandan ŝanĝigon ene de mi. Mi rimarkis, ke mi malsame reagis al konataj situacioj — eĉ en streĉa situacio, mi restas relative trankvila kaj pacienca. Aferoj kiuj antaŭe multe ĝenis min nun ne multe ĝenas min. Ili ankoraŭ ne plaĉas al mi, sed ne plu ĝenas. Mi nun havas la internan trankvilon povi elekti ne ĝeniĝi pro ili.

Al mi ŝajnas ke dum mia restado ĉe Oomoto, mia koro iom puriĝis, ĉar mi nun sentas internan pacon kiam mi antaŭe ne sentis. Povas esti, ke tio estas tre subtila ŝanĝo, sed ĝi havas grandan efikon al mia vivo. Antaŭ ol restadi ĉe Oomoto, mi ne taksis serioza la efikon de ritoj, alie ol eventuala psika persvado. Tamen, mi atestas ke *io* ĉe Oomoto efikis al mi. Ĉar mi plejparte ne komprenas la signifon de la japanaj vortoj uzataj en la ritoj, la psika efiko apenaŭ ekzistas. Sed mi foje povis *senti* ion edifan dum oomota rito, kvankam mankis al mi racia klarigo pri ĝi.

Kvankam homoj sur nia planedo estas ĝenerale en simila evolustadio, iliaj aktualaj evolupunktoj kaj elektitaj vojoj multe diversas. Por iuj, la instruoj de Martinus plej taŭgas; por aliaj, pli taŭgas iu religio kia Budhismo, Islamo, Bahaismo, Kristanismo, aŭ Oomoto. Mi havas la privilegion profiti el pluraj skoloj, inkluzive de Oomoto kaj Martinus.

En 2011 originale verkita en Esperanto de Joel Brozovsky <betulo@mac.com>

Por pli da informo pri Oomoto, bonvolu vidi <http://eo.wikipedia.org/wiki/Oomoto>



Konciza historio de Oomoto

de Joel Brozovsky

En 1892 la Fondintino de Oomoto, DEGUĈI Nao, komencis ricevi Diajn revelaciojn en tranco. Kvankam analfabeta, ŝi per aŭtomata skribado skribis ĉ. ducent mil paĝojn, kiuj kolektive estas la unua sankta skribo de Oomoto, nomata Ofudesaki. Ĝi anoncas la aperon de nova erao, por kies alveno necesas la “rekonstruado de la mondo”.

Dum unu semajno en 1898 la Kunfondinto de Oomoto, DEGUĈI Onisaburo, ricevis multajn spiritajn revelaciojn, kaj ekkomprenis sian rolon. En la sekva jaro, laŭ Dia gvido, li

oomotaniĝis, edziĝis kun Sumiko, la kvina filino de DEGUĈI Nao, kaj kun la Fondintino komencis konstrui la bazon kaj strukturon de la religio Oomoto.

En 1921 Onisaburo komencis verki la duan “sanktan skribon” de Oomoto: Rakontoj el la Spirita Mondo en 83 libroj. En la sama jaro li konatiĝis kun Esperanto. Du jarojn poste, Esperanto iĝis la oficiala lingvo de Oomoto por internacia agado.

En la tempo de Onisaburo, Oomoto akiris multajn adeptojn kaj grandan influon en Japanio. La tiama registaro timis ĝian influon, kaj dufoje okazigis grandajn subpremojn al Oomoto, detruante la konstruaĵojn kaj arestante multajn gvidantojn. Post la fino de la Dua Mondmilito, la nova registaro plene absolvigis Oomoton, sed la kalumnioj de subpremo iom restis en la mensoj de la popolo, kaj Oomoto ne plu estas tiom granda kaj influhava en la Japana socio.

En 1952 Naohi, la plej maljuna filino de DEGUĈI Onisaburo kaj Sumiko, iĝis la Tria Spirita Gvidantino kaj komencis revivigi la organizon. Ŝia tria filino Kijoko iĝis la Kvara Gvidantino en 1990, kaj en 2001 ŝia



Jasumi HIROSE (1925-2007) kaj Eiji DEGUĈI (1919-2006) en la korto de kastelo Kronborg en Elsinoro. Ili fariĝis edzoj de filinoj de la Tria Spirita Gvidantino, s-ino Naohi DEGUĈI. En 1990 la tria filino Kijoko DEGUĈI fariĝis la Kvara Gvidantino. En 2001 Kurenai DEGUĈI, nevino de Kijoko, iĝis la nuna Kvina Gvidantino de Oomoto.



Peter Zacho, Jasumi Hirose, Eiji Deguchi, Martinus, 1957

nevino Kurenai iĝis la Kvina Gvidantino, kiu ankoraŭ gvidas Oomoton. Laŭ Ofudesaki, la gvidanto de Oomoto devas esti virino kaj ŝi devas esti praïdo de la Fondintino.

DEGUĈI Kurenai estas esperantisto, kaj ŝia aktiva uzo de la lingvo inspiras pli da esperanta aktiveco en

Oomoto. Ŝi nun gvidas Oomoton laŭ ambiciaj planoj por celebri la 120-an datrevenon de la fondiĝo, en 2012.

Pliajn informojn oni povas trovi interrete pri Oomoto ĉe www.oomoto.or.jp/Esperanto/index-es.html kaj pri la esperanta agado ĉe www.epa.jp.



Eiji Deguchi, Martinus, Jens, Vera, kaj Kirstine Cavling, Ib Schleicher, 1957

Ĉu guto traboros la monton granitan? de Ole Therkelsen

Dum mia monata vizito en Parizo mi prelegis pri la kosmologio, france ĉe amikara rondo de Allan Kardec en 15 rue J.J. Rousseau, (usfipes.org), kaj en UFE, Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis rue de la Cerisaie, 75004 Paris. (esperanto-france.org).

La 18-an de novembro 2010 mi mem aŭdis prelegon, kaj ĝuste tiun de la japana mecenato Etsuo Miyoshi, kiu parolis pri lia diskonigo de Esperanto. La salono estis plena kun i.a. estraranoj de "Esperanto-France" kaj Isabel Castro de Konsilio de Eŭropo. Etsuo inventis

la baston-valizon Walkin'Bag, kies vendado ekonomie helpis lin diskonigi Esperanton. Etsuo plurfoje reklamis Esperanton pere de tutpaĝaj gazetanoncoj. La plej lasta aperis la 15-an de decembro 2010 en la fama franca gazeto *Le Monde*.

Il y a une solution au problème linguistique

«Une langue nationale n'est pas la réponse. L'espéranto serait une solution non-discriminatoire.»

Les droits linguistiques ne sont pas respectés

Où va le plurilinguisme en Europe

La France mit son veto à la solution

Petite leçon d'Espéranto

Videblas fotoj de Nobel-premiito (ekonomio 1994) Reinhard Selten kaj Louis Zaleski-Zamenhof

L'Espéranto, ou la réussite d'un certain esprit humaniste

L'occasion des 150 ans de la naissance de Louis-Lazare Zamenhof, le fondateur de l'Espéranto, son petit fils Louis-Christophe Zaleski-Zamenhof revient sur les origines et les fondements de l'ambitieux projet de son grand-père, une langue internationale pour tous les peuples.

L'Espéranto dans les écoles, l'Espéranto dans le monde

Petite leçon d'Espéranto

Association Française des
Cheminots pour l'Espéranto



S-ro Etsuo MIYOSHI, el Japanio

prezidanto de societo « SWANY »,
vojaĝas per siaj du valizoj « Walkin Bag »

Li ĉiujare aperigas anoncojn pri Esperanto en « Le Monde ».

Li prelegos pri :

" Ĉu guto traboras la monton granitan? "

ĵaŭde, la 18an de novembro 2010, 17h30

Salono Lutèce, 6a etaĝo

**9 rue du Château-Landon
Paris - 10a**

Etsuo Miyoshi inspire kaj emoci-plene parolis. Li diris, ke li deziras kontribui al la Oomoto-devizo: Unu Mondo, Unu Dio, Unu Interlingvo, kaj li koncentriĝas al unu komuna lingvo. Etsuo esprimis sian dankemon al la oomota Majstro Hidemaru Deguchi, kiu revis pri la fina venko de Esperanto. Lia filo Kyotaro Deguchi verkis la libron "Rondvojaĝo en E-lando", kiu kaptis la atenton de Etsuo, kaj instigis lin studi Esperanton.

Ĝingis-Ĥano amasigis 200 mil soldatojn, breĉis la Grandan Muron en nur unu loko kaj venkis la tutan Ĉinion. Imitante tion, Etsuo Miyoshi

Dum la franca prelegturneo Etsuo Miyoshi malsaniĝis kaj lia persona sekretario Atilio Orellana Rojas transprenis la lastajn prelegojn en Lyon, Avignon, Marseille kaj Mulhouse.



Atilio Orellano Rojas
nun laboras en Japanio

La titolo de la interesa prelego aludas al la poemo *La Vojo* de Zamenhof.

La Vojo

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante
Ni iru la vojon celitan!
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
Traboras la monton granitan,

L'espero, l'obstino kaj la pacienco –
Jen estas la signoj, per kies potenco
Ni paŝon post paŝo, post longa laboro,
Atingos la celon en gloro.

Martinus en UEA-revuo *Esperanto*

En januaro en la UEA-revuo *Esperanto* n-ro 1-2011 sub la titolo *Danio, la ĉi-jara kongreslando* estas artikolo de Jens Stengaard Larsen: *Eldonaĵoj kaj eldonejoj en Danio*.

Post mencio de longa vico de danaj verkistoj kaj eldonejoj li skribas: “Iom flanke staras la Instituto de Martinus. Temas pri entrepreno kiu disvastigas la ideojn de la dana verkisto kaj mistikisto Martinus Thomsen (1890-1981). Unu el la ideoj estas Esperanto kiel ĉefa internacia lingvo de la instituto, kaj multaj el la verkoj de Martinus estas esperantigitaj.” /Jens S. Larsen

Martinus: Mistikisto? Ne!

Leterkesto, Esperanto n-ro 2-2011:

En la artikolo *Eldonaĵoj kaj eldonejoj de Danio* la mondsaĝulo Martinus, kiu naskiĝis en Danio, estas preparolita kiel mistikisto; sed homo, por kiu eblas sekvi

kaj kompreni la vivanalizojn de Martinus, iĝas liberigita de ĉia mistiko koncerne la vivon. Tial titolon kiel mistikisto oni ne donu al Martinus, almenaŭ ne se oni emas rakonti la veron.

Martinus laboris por helpi la homaron leviĝi el la pensoj kaj agoj de milito kaj malamo en pensojn kaj agojn necesajn por la kreado de nova humaneca mondkulturo, kaj kiel helpilon al tiu procedo li elektis en 1961 Esperanton kiel internacian lingvon koncerne sian laboron.

Martinus parolis al mi pri tiu elekto, kiun li faris pro la logikeco de Esperanto kaj pro tio, ke lia laboro kaj Esperanto havas la saman kernan celon. La lingvon Esperanto li rekte agnoskas kiel treege signifan ilon por helpi la homaron al la kreado de pli justa kaj pli humaneca mondo. Kiam oni bezonas doni titolon al Martinus Thomsen, oni povus uzi la vorton *vivanalizisto*.

/Kirsten Thuro



Universala Esperanto-Asocio

en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko

Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando

☎ +31 10 436 10 44 📠 +31 10 436 17 51

Kongresa statistiko: Franca-germana duelo

884 aliĝiloj al la 96-UK en Kopenhago (23-30 julio 2011) estis registritaj ĝis la 15-a de januaro.

Fine de la unua kotizperiodo okazis grava ŝanĝo en la statistiko: pri la unua loko konkurencas Francio kaj Germanio, dum Danio troviĝas nun sur la kvara loko, ĉar ankaŭ Japanio liveris pli da aliĝoj ol la gastigonta lando. La landoj kun pli ol 20 aliĝintoj estas: Francio (125), Germanio (118), Japanio (73), Danio (70), Pollando (56), Nederlando (48), Brazilo (34), Svedio (33), Rusio (31) kaj Belgio (27).



E-semajno en Martinus-Centro en 2011

Inter 30-a julio kaj 6-a de aŭgusto 2011 la Esperanto-semajno en Klint okazos paralele kun dana, sveda, angla kaj germana kursoj en internacia etoso. Matene estos interpretata prelego, poste studrondoj, posttagmeze estos konversaciaj rondoj. Ne estos prelegoj rekte en Esperanto, nur interpretitaj en la granda prelego. En la vespero estos distra programo kaj teo kaj kukoj en la restoracio *Terrassen*. /Ole Therkelsen

“Martinus, Darwin kaj inteligenta dezajno” en hispana kaj angla lingvoj

Richard Michell el Anglio tradukis la libron *Martinus, Darwin and Intelligent Design* de Ole Therkelsen en la anglan lingvon. (amazon.com).

Eduardo Serrano, Venezuelo, tradukis la libron el la angla en la hispanan – *Martinus, Darwin y el Diseño Inteligente*. (oletherkelsen.dk)

La 15-an de julio 2010 la sveda eldonejo “Världsbild förlag”, Stockholm, eldonis ambaŭ librojn, kiuj estas akireblaj ĉe la adreso: www.varldsbild.com. /Ulf Sandström



Oficiala voĵŝildo: Martinus Center 2 km

Post oficiala petskribo al la komunumo “Odsherred”, urbodomo en Højby (*Teknisk forvaltning, Odsherred Kommune*), la teknika sekcio aprobis la starigon de oficiala voĵŝildo en Nyrup ĉe la kruco inter la vojoj Klintvej kaj Odden-ŝoseo. La ŝildo estas praktika helpilo por la kursanoj, sed krome ĝi estas bona varbilo por homoj, kiuj nur preterpasas. /Ole Therkelsen

INFORMO PRI

LA TRIA TESTAMENTO

La celo de la revuo *Kosmos* estas doni enrigardon en tiun mondbildon, kiun la verkisto Martinus (1890-1981) priskribis en vico da libroj kun la kumuna titolo: *La Tria Testamento*.

La mondbildo de Martinus estas logika analizo de la spiritaj leĝoj kaj principoj de la vivo. La nova mondbildo estas studebla per la libroj de Martinus, kiuj eldoniĝas de la Martinus-Instituto, kaj per prelegoj, kursoj, studrondoj kaj informoj en la Interreto. Okazas aktivecoj en la Martinus-Instituto en Kopenhago, en la Martinus-Centro en Klint ĉe Nykøbing Sjælland, en aliaj lokoj en Danio kaj eksterlande. Pliajn informojn oni ricevas kontaktante la Martinus-Instituton. La disvastiĝo de la konoj pri *La Tria Testamento* okazas sen ia formo de membreco aŭ kreado de asocio.

La frontpaĝa bildo: *La flago*, foto: Nina Bogø Pedersen

Eldonanto: Martinus-Instituto

Mariendalsvej 94-96

DK-2000 Kopenhago

Tel: (+45) 38 34 62 80

fakso (+45) 38 34 61 80

Telefontempo:

lundo-ĵaŭdo 13-16

vendredo: 9-12

DK p.ĝiro 642-9580

UEA-kodo mins-d

www.martinus.dk

info@martinus.dk

shop.martinus.dk

Redakcio: Ole Therkelsen (respondeca),

Helen Claesson kaj Jonas Dalmose.

Kompostado: Dan Elhaŭge.

Abono: Jare 2 ekzempleroj

Prezo en EU: DKK 75,00 aŭ EUR 10,00

Prezo ekster EU: DKK 60,00 EUR 8,00

aŭ USD 12,00

Unuopaj kajeroj: DKK 40,00

Se vi ne povas pagi per fremda valuto, demandu al la Instituto

Kopirajto: © Martinus Institut

Redono de teksto nur laŭ skriba permeso.

ISSN 1600 41 16.



BENVENON AL MARTINUS-CENTRO, KLINT

Martinus Center Klint

Klintvej 69, Klint · DK-4500 Nykøbing Sj. · Tel.: +45 59 30 62 80

Martinus Institut

Mariendalsvej 94-96 · DK-2000 Frederiksberg · Tel: +45 38 34 62 80
info@martinus.dk · www.martinus.dk · shop.martinus.dk